

OPINIOJ, PRITAKSOJ, RAPORTOJ PRI LA 42-A ILEI KONFERENCO EN KRAKOVO

Opinioj de partoprenintoj

Prof. Dieter Hans Quednau, Germanio:

Nome de AIS mi elkore dankas al vi pro la perfekta organizado de la ILEI-konferenco en Krakow — dum kiu okazis 7 kursoj, kiuj validas ankaŭ por studado en AIS. (Entute estis donitaj 18 AIS-atestoj).

Mi esperas, ke tiu pozitiva sperto rezultigos pluan kunlaboron inter ILEI kaj AIS, ekzemple sur la kampo de la pluklerigado de Esperanto-instruistoj. Flanke de AIS ni povas i. a. oferti retkursojn pri Lingvo-Orientiga Instruado kaj Interlingvistiko, publicitaj en <http://www.ais-sanmarino.org/klerigofico/virt.html>, sed tiu oferto estas certe plivastigebla.

Kun elkoraj salotoj
Dieter Quednau

Renato Corsetti, Italio:

Konferencejo: tre taŭga, tre bona, tre bonaj loĝkondiĉoj

Programo: Tre bone strukturita en paralelaj plurtemaj blokoj. Tro da bonaj programeroj por ne tro multa publiko.

Ĝenerala pritakso: unu el la plej bonaj lastatempaj.

Amri Wandel, Israelo:

Mi tre ĝuis la partoprenon en ILEI-konferenco (mia unua!).

Amike,
Amri

Alicja-Ursula Lewanderska-Quednau, Germanio:

Mi jam frue dankis al antaŭa kaj nova estraro de ilei, kaj post preparado kun cheestantoj mi trasendis dankojn kaj altan pritakson de arango.

Lauh mi - persone la etoso en Krakovo estis vere bona kaj scienca

amike kaj sincere alicja lewanderska

Anna Löwenstein, Italio:

La nivelo de la konferenco estis bonega, ĉar vi havis tre altkvalitajn prelegantojn. La parto, kiu ŝajnis al mi iom teda, estis la oficiala parto, t. e. la kunveno kun polaj fakuloj, kiuj ne konis Esperanton kaj laŭtlegis detalajn sed ne aparte interesajn informojn.

Pri eventuala kritiko vi jam mem scias, kaj sendube aliaj homoj komentis same: estis eĉ tro da altkvalitaj prelegoj kaj samtempaj ekskursoj kompare kun la nombro de partoprenantoj,

tiel ke ne sufiĉe da aŭskultantoj ĉeestis la diversajn aranĝojn. Tre bedaŭrinde por la prelegantoj, kiuj zorge pretigis sian materialon por prelegi al 5-6 homoj.

Vi grandioze laboris, por organizi tiom da bonegaj prelegoj kaj ekskursoj! La sola mistakso, bedaŭrinde, rilatis al la manko de tempo.

Kore,
Anna

Michael Farris, Pollando (reage al komento de Anna Löwenstein):

Mi ĝenerale konsentas pri via taksado de tiu parto sed mi tamen opinias, ke iom da tedeco estas malalta prezo por eĉ iomete kunigi esperantistajn kaj neesperantistajn fakulojn. La ununura vere teda prelego estas de studentino, kiu ne klopodis pri esperanta traduko de sia prelego (kaj mi esperas ke iu taktoplene sciigis la studentinon kaj shian profersorinon pri la manko de ghentileco).

-Michael Farris

Irmgard Sghneider, Germanio (reage al komento de Anna Löwenstein):

Unuafoje mi partoprenis ILEI-konferencon kaj trovis ghin ege valora. Pro via enorma laboro mi tre dankas vin.

Precipe mi dankas por tio, ke helpanto kaptis min che la trajno (male mi suferis sola reen), ke Petro trankviligis min kontraŭ paniktimo antaŭ tia beleeeeeeeeeeeega salminejo, kaj ke mi laueble ricevis vegan-manghajhon.

Mi substrekas tion kion Anna skribis.

Char mi antaue mendis ekskursojn — ni ja estis petitaj antaŭmendi — ne eblis samtempe cheesti prelegojn, kion mi tre bedaŭris; aliflanke la ekskursoj estis tiel agrablaj ke mi tre volonte partoprenis, char estas bela urbo kaj bela regiono; do, unu semajno ne sufiĉas por multaj bonaj prelegoj kaj (samtempaj) ekskursoj. Mia propono por venontaj konferencoj; povus esti ke dumsemajne estus prelegoj kaj je la flankaj semajnfinoj ekskursoj.

Kion mi ne tre shatis estas la distraj vesperoj; estis por mi tro laute por resti, sed mankis dua chambr(et)o por ion alian fari au simple babili.

Amike,
Irmgard

Dennis Keefe, Ĉinio (reage al komento de Anna Löwenstein):

Mi konsentas kun la komentoj de Anna pri la Konferenco, kaj mi gratulas, ke estis tiom da homoj kiuj laboris tiom da horoj por starigi la Konferencon de Krakovo. Aldone al tio, mi esperas, eble en la diskutlisto de ILEI, EINS, ekparoli pri la enhavo kaj strukturo de ILEI Konferencoj por la venonteco.

Mi persone ankoraŭ ne havas konkretajn ideojn pri la bona enhavo de ILEI Konferenco, sed shajnas al mi, ke estus pli bone se la fokuso de ILEI Konferenco estus **multe pli pri pedagogio de la lingvo Esperanto**, pri ekzamenoj, pri interreto kaj instruado, pri la sukcesoj en diversaj landoj pri instruado de Esperanto, pri la malsama instruado por infanoj por junuloj kaj por

maljunuloj, pri kio estas kompleta kurso, ktp. Resume chio kio okazas dum la konferencaj laborhoroj estu pri la instruado de Esperanto (kaj rilataj temoj kiel la varbado de gelernantoj...) Mi ne estas kontraŭ la ekskursaj kaj distraj kaj flankaj partoj, sed ke ili okazu eble ekster la laborhoroj.

Amike,
Dennis

Nancy Fontannaz, Svislando (reage al komento de Dennis Keefe):

Mi venis en ILEI-konferencon por lerni instrui esperanton, mi opiniis, ke estas la plej bona loko por tio, sed mi tre bedaŭris, ke nur Ana Montesino de Gomis kaj Elisabeth Barbay povis doni al mi konkretajn rimedojn kaj ideojn por plibonigi mian instruadon. Ankaŭ Stano Marchek montris interesan materialon, sed mi jam konis ĝin. Fakte mi ne povis cheesti aliajn interesajn prelegojn, seminariojn, ktp, pro ekskursoj... Mi bedaŭris, ke mi elektis tiom da ekskursoj (fakte tre interesaj), kiuj okazis samtempe kiel valoraj prelegoj... Mi ne sciis antaŭe... Mi vere dezirus, ke ili okazus ekster la laborhoroj...

Mi ankaŭ deziris pretigi por ekzameno, sed bedaŭrinde tia pretigo ne estis planita... Sed mi vere dankas pro la programo tiel riĉa, tiel interesa, pro la mirinda studentĉambro, pri la bongustaj manĝoj, pro la agrablaj vesperoj... Chio estis bonege organizita... Dankon al ĉiuj !

Plejamike
Nancy Fontannaz

Annarosa Andrei, Italio (reage al komento de Nancy Fontannaz):

Mi tute akordig'as kun vi, kun viaj celoj (*partopreni ILEI konferenco por lerni instrui E-on*), kaj kun via plendo (*Mi bedaŭris, ke mi elektis tiom da ekskursoj ..., kiuj okazis samtempe kiel valoraj prelegoj... Mi ne sciis antaŭe ...*): ankaŭ al mi okazis partopreni en tro da (belegaj) ekskursoj, ĉar oni ne sciis antaŭe la enhavon de la programo.

Amike
Annarosa

Zsófia Kóródy, Germanio (reage al komento de Nancy Fontannaz):

Jes, estas bone diskuti pri la temo kaj auxdi, kiu kiel imagas bonan konferencon. Mi konsentas kun Dennis kaj tiuj, kiuj esperas havi pli da pedagogio, praktika helpo al lingvoinstruistoj. Tamen internacia konferenco ne estu nura metodika trejnejo, tiun rolon plenumu trejnesioj, seminarioj

Ni ne forgesu, ke ILEI-konferenco, prezentado de sciencaj temoj, fakkunsidoj estas gravaj por kelkaj gekolegoj laborantaj en universitatoj, sciencaj institucioj. Alikaze konferenco ekz. en Afriko postulis pli da programoj kun praktika, seminaria karaktero.

Do, ni strebu je iu bona ekvilibro kaj atentu la cxiujarajn bezonojn de la organiza lando. Diskuto, spertintersxangxo gravas, ju pli el ni diras sian preferon, opinion, donas konsilojn, des pli kontentigan rezulton ni povos atingi.

Korajn salutojn de
Zsofia

Opinioj de nepartoprenintoj

Marc Bavant, Francio:

Mi rigardis vian programon (cetere kun envio), cxar mi tre sxatintus partopreni la ILEI-konferencon, des pli en Krakovo!

Amike,
Marc

Birthe Lapenna, Danlando:

Fakte estas iom strange, ke ghuste de ILEI oni nenion audas pri tiu persono, kiu ja havis grandegan influon je la lernejoj, universitatoj ktp. Chie en la mondo oni celebras Ivo Lapenna, sed mi ankoraŭ nenion vidis de ILEI.

Mi bedaŭras, ke ILEI ne sufiche bone organizis la kunvenon en Krakovo pri Ivo Lapenna. Mi audis, ke nur "manpleno" cheestis la prelegon de s-ro Pleadin, char samtempe oni aranghis aliajn kunvenojn kaj ekskurson!...

Mi bone scias, ke vi faris/as vian plej eblon, por ke la Konferenco estu kiel eble plej altnivela. Temas nur pri la organizintoj. Ili ne sufiche bone organizis ghin. Tio ja estas la realajho, TRE bedaŭrinde!

Fakte la tuta Movado stagnas. Ne estas nur en ILEI, sed kion fari?

Amike,
Birthe L.

STATISTIKA RAPORTO PRI LA 42-a ILEI-KONFERENCO

La 42-a ILEI konferenco okazis la 17-25an de julio 2009 en Krakovo, Pollando.

La jaro 2009 estas jubilea jaro por ILEI — la organizo festas sian 60-jariĝon.

Estis ankaŭ pliaj jubileoj. 150-a jaro post naskiĝo de L. L. Zamenhof estis emfazita per konferenca temo *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*, kunlabore kun UEA pri temo de UK *Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ*. Ankoraŭ du jubileoj 100-jariĝo de I. Lapenna kaj 85-jariĝo de I. Szerdahelyi (prezidanto de ILEI en 1985-1987) estis emfazitaj per nomoj de salonoj kaj festaj prelegoj pri niaj famaj samideanoj de Ilona Koutny (PL) *Loke kaj fake, internacie kaj home: 85-jara datreveno de István Szerdahelyi* kaj Josip Pleadin (HR) *Ivo Lapenna — konstruinto de la moderna esperanto-movado*.

La konferenco havis multajn subtenantojn. La Alta protektanto estis s-ro Marek Nawara marŝalo de la Malgrandpola vojevodio. La Honoraj patronoj estis s-rino Katarzyna Hall ministrino de Ministerio de la Nacia Edukado en Pollando, s-ro Roman Ciepela vicmarŝalo de la Malgrandpola vojevodio, Prof. d-ro habil. inĝ. Włodzimierz Roszczyński Rektoro de la Supera

Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo, Prof. d-ro habil. Zbigniew Paweł Kruszewski Rektoro de la Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Plocko kaj Prof. d-ro habil. Michał Śliwa Rektoro de la Pedagogia Univeristato en Krakovo. Amaskomunikilaj patronoj estis Radio Kraków Małopolska kaj TVP Kraków. Niaj kunlaborantoj kaj partneroj estis Interlingvistikaj studoj de Universitato Adam Miczkiewicz en Poznań, la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo, Pedagogia Universitato en Krakovo, La Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Plocko kaj, kompreneble, pola sekcio de ILEI. Ni havis ankaŭ financajn subtenantojn: inter aliaj, Estraro de pola ILEI-sekcio, Barbara Przybysz-Wojciechowska — direktorino de la Publika Elementa Lernejo en Czajowice, Robert Kamiński — prezidanto de Filio de PZE Łódź, Leszek Piekut, „Grafokom“ Đurđevac (Kroatio).

Al la konferenco aliĝis 81 personoj, sed pli aŭ malpli longe partoprenis 84 (2005 — 54; 2006 — 64; 2007 — 74; 2008 — 46). Membro de Krakova E-societo Grażyna Porada aranĝis por ni mankantan Libroservon kaj verdire nur deĵoris, apenaŭ ĝuis la programon kaj nur mallonge nin vizitis unu el la plej fidelaj helpantoj de LKK — Edvard Maliewicz. Al ambaŭ ni sincere dankas. Du personoj alvenis kaj aperis en diversaj programeroj sen aliĝo (oni estontece petu financon helpo kaze de financa neebleco pagi plenan aliĝkotizon por ne preni senpage servojn kiujn pagas la ceteraj konferencanoj). Ni havis aliĝintojn el 28 landoj (Pollando — 15, Italio — 6, Germanio kaj Kroatio po 5, Finnlando, Hispanio kaj Ukrainio por 4 (1 el Ukrainio ne venis), Belgio, Hungario, Japanio, Meksiko, Svedio kaj Usono po 3, Aŭstralio, Britio, Ĉinio, Francio, Kubo, Svislando po 2, Bulgario, Ĉeĥio, Israelo, Litovio, Nederlando, Rumanio, Serbio, Slovakio po 1) kaj po 2 nealiĝintajn el Ukrainio kaj Pollando. Fojfoje en la konferenco aperis ankaŭ helpantoj — familioj de Hawlena-Krzemińscy kaj Kuźmicy, du junuloj Robert Kołodziej kaj Mateusz Kania, sed ili apenaŭ havis eblon profiti la programon, plejparte ili nur kuris tien kaj reen plenumante diversajn taskojn. Dankon al ili ĉiuj.

La konferenco okazis en la Supera Lernejo pri Bankismo kaj Direktado (WSZiB), kie ni havis tre bonajn kondiĉojn por konferenci, eblis uzi ĉian modernan teknikon, atingi samideanojn, kiuj estis for de Krakovo kaj skajpkonferenci kun ili (pliaj informoj pri WSZiB en www.wszib.edu.pl en la pola kaj la angla).

La Malfermon partoprenis Ĝenerala sekretario de UEA Barbara Pietrzak, kiu salutis la konferencon nome de UEA-estraro, kaj ankaŭ laŭtlegis mesaĝon de Claude Normont, vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo kaj edukado. Nin honoris ankaŭ rektoro de WSZiB prof. Włodzimierz Roszczyński, kiu alparolis la konferencanojn en Esperanto.

Salutvortojn sendis Prezidanto de UEA (Probal Dasgupta), Senata sekretario de AIS (prof. Dr. Reinhard Fössmeier), Prezidanto de TEJO (Gregor Hinker), Prezidanto de PEA (Halina Komar) por Renkontiĝo de universitataj instruistoj ankaŭ Ĝenerala sekretario kaj Administra direktoro de Internacia Asocio de Universitatoj (IAU) ĉe UNESKO-domo (Eva Egron-Polak). En Konferenca Libro aperas ankaŭ salutvortoj de Prezidanto de ILEI (Radojica Petrović) kaj pola sekcio de ILEI (prezidanto Piotr Nosek, sekretario Małgosia Komarnicka, kasisto Magdalena Tatara).

La nuna jaro estis ankaŭ elektojaro, do okazis ne nur Komitatkunsido en kiu estis elektita nova estraro de ILEI. Ankaŭ kunsidis la ĵus elektita estraro dum la lasta sesio, kune kun reprezentantoj de aliaj e-organizoj, por preparoli eblan kunlaboron. Pri decidoj partoprenantoj estis informitaj dum la Ĝenerala Asembleo antaŭ la Solena Fermo.

La programo de la konferenco estis tre riĉa, abunda, ambicia kaj, mi eĉ aŭdacus diri, vere bonkvalita kaj altvalora. Entute okazis 124 programeroj, sen kalkuli, ke Simpozio konsistis el 19 eroj, Lingva Festivalo el 15 eroj, kaj krome 6 sesioj de komitatkunsido kaj 4 de estrarkunsido. Pluraj programeroj ĉiam okazas dum UK, sed por 2000-3000 partoprenantoj. Ĉijare dum EEU kongreso (kun aliaj samlokaj samtempaj aranĝoj) okazis ĉirkaŭ 100 programeroj por ĉirkaŭ 400 partoprenantoj — nur dum ILEI konferencoj ĉiu partoprenanto estas prizorgata tiel, ke tiu povas kalkuli je propra, persone por ŝi/li pretigita programero.

Okazis jam kutimaj programeroj de ILEI-konferencoj, sed estis ankaŭ io nova.

Dum Interkona (manĝ)vespero ĉiu alveninto mallonge prezentis sin, sian landon kaj alportitan frandaĵon. Poste ĉiuj gustumis, interparolis en amika neformala kunesto kaj gaja etoso — vere konatiĝis, se ili ne ankoraŭ estis konataj.

Tuj post la Solena Malfermo ĉefprelegon *La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto* faris Duncan Charters (US).

Dum la konferenca semajno okazis kelkaj seminarioj: *La rolo de la nuntempa teknologio en la lingvoakirado* (6-foje) gvidis Duncan Charters (US); *Esperanto-literaturo* (6 foje) gvidis Lidia Ligeza (PL); *Rolludoj* (4-foje gvidis Stefan MacGill (HU); *Lingvaj ludoj* (3-foje) gvidis Ana Montesinos de Gomis (GB); *Interkultura komunikado* (3-foje) gvidis Kristin Tytgat (BE); *Esperanto laŭ rekta metodo* (2-foje) gvidis Stano Marček (SK). Al seminarioj iom similis *Poezia metiejo* (6-foje) gvidita de Lidia Ligeza kaj Adam Łomnicki (PL), prelegserioj *La pola eksprese* (6-foje) gvidis Magdalena Tatara (PL) kaj *Ekkonu Pollando* (6-foje) gvidis Małgosia Komarnicka kaj Piotr Nosek (PL) — la lasta havis prelegojn kun titoloj: *Mallonge pri longa historio de Pollando* (gastparolanto Hans-Dietrich Quednau), *Krakovo, la konferenca urbo — klaĉoj kaj legendoj* (gasto Lidia Ligeza), *Pollando kian vi ne konas, Pollando per okuloj de eksterlandano* (gasto Augusto Casquero de la Cruz), *Polaj frandaĵoj kaj tradicioj* (gasto Irena Czechowska — mastrino de bankedo), *Tio, kion vi volas scii, sed hontas demandi*.

Pluraj samideanoj faris unuopajn prelegojn: *Loke kaj fake, internacie kaj home: 85-jara datreveno de István Szerdahelyi* Ilona Koutny (PL); *Etna kaj lingva diverseco en Ameriko: defioj por edukado* — Maritza Gutiérrez González (CU); *Kalkulu mense, ne cifere sed imagante soroban-bidojn* — Kimie Markarian (GB); *La Ĉina eduksistemo* — Augusto Casquero de la Cruz (CN); *Lernolibra aŭtoro antaŭ la defioj de nuntempa gramatika manlibro* — Ryszard Rokicki (PL); *Strukturo kaj superstrukturo en la pensado de Zamenhof pri paco* — Renato Corsetti (IT); *Esperanto en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo: kial kaj kiel Internacia Lingvo* — Amri Wandel (IL); *Kial ILEI bezonas FIPLV kaj inverse?* — Jennifer Bishop (AU); *Novaj atingoj de lingvoponto* — Marija Jerkovič (HR); du prelegojn faris Michail Lineckij (UA) *Reklamado de Esperanto kaj Subteno kaj defendo de naciaj kulturoj*.

Okazis kelkaj diskutrondoj: *Uzo de ludoj en kursa instruado de Esperanto* gvidis Michail Lineckij (UA) *Strategio por vera „neutrala“ mult-lingvismo* gvidis Michael Cwik (BE).

La lasta programero de la labortago, tuj antaŭ vespermanĝo, jam estis iom pli malstreĉiga, ripoziga, gaja, amuza — kvazaŭ enkonduko al vespera programo (ja homoj jam iom lacas post preskaŭ tuttaga laboro kaj iom malfaciletas koncentriĝi por ankoraŭ io plia tre faka): skeĉoj, lumbildaj prezentoj, kvizoj, ludoj k. s.: *Skeĉoj* prezentis Stefan MacGill (HU); *E@I* (skajpkonferenco) — Peter Baláz (SK); *Kiel Reklami Esperanton kaj la DVD kurso, „Esperanto, Pasporto al la tuta mondo“* anstataŭ por distra programo proponita *Kantoj de „Pasporto al tuta mondo“* — Lucille Harmon (US); *Tri saĝuloj* (kvizo) — Michail Lineckij (UA); *Juna Amiko kaj IPR* — Stefan MacGill (HU); *Dialogo* (rolludo) — Michail Lineckij (UA); *Tabloludoj* — Elizabeth Barbay (FR); *Origamio* — Kimie Markarian (GB); lumbildaj prezentoj: *Vivo en Esperanto-urbo — rakontoj, prezentado de personaj spertoj* — Zsófia Kóródy (DE); *Vojaĝo tra minoritataj lernejoj en nordaj Vjetnamio kaj Tajlando* — Amri Wandel (IL); *Afrika konferenco 2008* — Aida Čížikaitė

(LT). Aparte menciindas *Invito al sekvajara konferenco en Kubo* Maritza Gutiérrez González kaj Julián Hernández Angulo (CU).

Jam tradiciaj internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA ĉijare ne okazis, ĉar ... mankis dezirantoj ekzameniĝi. Tamen salonoj ne restis malplenaj — samideanoj surloke proponis diversajn programerojn: Martin Schäffer (ME) proponis prelegon *Lingvistika situacio en la mondo 150 jarojn post la naskiĝo de Zamenhof*; Zsófia Kóródy (DE) proponis prelegon *Lernejoj por ĝemelurbaj kaj internaciaj kontaktoj*; Augusto Casquero de la Cruz (CN) prelegon; Radojica Petrović (CS) lumbildan prezenton *Afrikaj perspektivoj: ILEI-seminario en Kinŝasa* kaj aliajn erojn plenigis Dennis Keefe (CN) per prelegoj pri *BEK kurso kaj A. Cseh metodo kaj Universitato de Nanjing kaj ebloj por Esperanto* (2-foje), *Preparseminario por LF* (2-foje), *Diskutrondo pri strategio en e-movado* (2-foje).

Simpozio ĉijare okazis jam la 5an fojon kaj estis la plej ampleksa el ĉiuj antaŭaj. Ĝi daŭris dum tuta tago. Simpozion gvidis Witold Stepniewski kaj Ilona Koutny. Ĉefprelegon *Eduksistemo en Pollando* faris Tomasz Malicki (PL). Esperantistoj sciencistoj faris jenajn prelegojn: Renato Corsetti (IT) *Szerdahelyi, Frank kaj Springboard: kion komunan ili havas?*; Jurek Żabowski (PL) *La postdiplomaj studoj kiel formo de la senĉesa klerigado en la Altlernejo; Włodkowic en Plock*; Adam Łomnicki (PL) *Diversaj formoj de aktivigado de studentoj dum Esperanto-lecionoj*; Ilona Koutny (PL) *Rolo de Esperanto en la interkultura komunikado*; Michael Farris (PL) *Ĉu vere ekzistas Esperanta kulturo?*; Duncan Charters (US) *La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto*; Teruhiro Sasaki (JP) *Pri nuna situacio de Esperanta edukado en Japanaj universitatoj* Lidia Ligęza (PL) *Pri poezio de Julia Pióro*; Wanda Jakubczyk (PL) *Taskoj de moderna edukado kaj Esperanto*; Nina Danylyuk (UA) *Lingvokulturemoj en esperantaj tradukoj de ukrainaj tekstoj*; Witold Stepniewski, Zofija Stepniewska (PL) *Kiu lingvo por estonta Eŭropo kaj mondo?* Sciencistoj neesperantistoj faris jenajn prelegojn: Andrzej Pisowicz (PL) *Esperanto - ŝanco por la Kaŭkaza regiono*; Joanna Hawlena kaj Anna Urbanek (PL) *Rolo de sciencaj rondoj en la eduka procezo de gestudentoj pri ekonomiko*; Maciej Klakla (PL) *Diversaj formoj de aktivigado de studentoj dum didaktika procezo*; Leszek Piekut (PL) *Renovigeblaj energifontoj - ŝancoj kaj defioj*; Maria Janiszewska (PL) *Psikoaktivaj metodoj en la instruado de fremdaj lingvoj*; Zbigniew Paweł Kruszewski (PL) *Premisoj por fondo kaj funkciado de Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj en la Altlernejo Włodkowic en Plock*. Por prelegi venis sciencistoj el 11 universitatoj el Pollando, Italio, Japanio, Ukrainio kaj Usono; estis faritaj 18 prelegoj. La Simpozio finiĝis per vigla paneldiskuto pri temoj de la prelegoj kaj konferenca temo ĝenerale.

Ĉijare ILEI plivastigis sian laboron kaj kunlaboron kadre de la konferenco. Sen kutimaj Simpozio (kunvenigo de esperantistoj kaj neesperantistoj sciencistoj) kaj LF (danko kaj donaco de esperantistoj al loka medio) dum la konferenco okazis ankaŭ sesio de AIS kaj dua Renkontiĝo de Universitataj Instruistoj (RUI), kiu daŭrigis laboron, komencitan pasintjare en Amsterdama konferenco.

Duan Renkontiĝon de Universitataj Instruistoj gvidis Renato Corsetti (IT). Komence estis reviziitaj atingoj dum unu jaro, poste sekvis du laborgrupoj — prelego kaj 3 laborsesioj: Ilona Koutny (PL) gvidis grupon pri *Universitata instruado de esperanto kaj interlingvistiko* kaj Kristin Tytgat (BE) pri *Universitataj kunlaboroj, interŝanĝoj kaj projektoj*. Dum fina sesio estis faritaj konkludoj, resumo, starigo de laborplano. Kunvenis 20 universitataj instruistoj reprezentanti 18 universitatojn de Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Aŭstralio.

Niaj gastoj — AIS — riĉigis programon de la konferenco per siaj prelegoj kaj prelegoserioj: Hans-Dietrich Quednau (DE) *Virtuala, distanca instruado*; Alicja Urszula Lewanderska-Quednau (DE) *Rolo de esperanto por resanigado de maljunuloj surbaze de kompensa pedagogio* (2-foje) kaj *Eksperimentoj el Hanau (DE) kaj Repty (PL) Dornach (CH)* (2-foje); Božidar Leonov (BG) *Bazaj principoj de turismiko, religia kaj ekologia turismo* (3-foje). Ankaŭ

kelkaj seminariroj de ILEI konferenco estis traktataj kiel AIS kursoj, entute estis enmanigitaj 18 atestiloj pri 7 kursoj.

Bedaŭrinde, ne ankoraŭ okazis io komuna kun ekz., ISAE kaj aliaj fakaj e-organizoj, sed laŭ planoj por estonto, interkonsente kun José Antonio Vergara, estrarano de UEA pri faka agado, por sekva jaro estas planata renkontiĝo de ĉiuj fakaj e-organizoj dum la lastaj tri tagoj de ILEI-konferenco.

Ni ne nur multe laboris — ni ankaŭ agrable pasigis tempon dum ekskursoj kaj vespera programo.

Okazis du tuttagaj ekskursoj al Zakopane kaj Wadowice, Kalwaria, Oświęcim, ankaŭ tri duontagaj: al salminejo Wieliczka, Niepołomice kaj piede tra konferenca urbo Krakovo. La ekskursojn gvidis membroj de LKK Lidia Lięza, Piotr Nosek, Magdalena Tatara kaj Gosia Nitkowska.

Tre bunta kaj varia estis kultura vespera programo. Dum Nacia Vespero fama E-aktorino Anna Ramza-Kozak (PL) recitis pecetojn el „Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz kaj Joachim Kołpanowicz (PL) belege ludis gitaron. Alian vesperon Jadwiga Gibczyńska (PL) prezentis monodramon laŭ la taglibreto de Ada Sikorska-Fighiera. Komunan kantadon gvidis Alan Bishop (AU), Michail Lineckij (UA) kaj Julián Hernández Angulo (CU). Ankaŭ dum Bankedo okazis koncerto — Janusz Grzecz (PL) prezentis polan kantatan poezion kaj tiun tagon ni finis per Konferenca balo. Aligatorejo estis programero, kiam ĉiuj partoprenantoj babilis nek Esperanton, nek sian denaskan lingvon, sed iu(j)n alia(j)n konata(j)n lingvoj(n) en malgranda(j) grupeto(j). Speciala kaj tre ampleksa estis programo de Internacia Vespero. Ĝin komencis Stano Marček (SK) per *Ekspozicio de lernolibro en 20 lingvoj*. Sekvis *Lingva Festivalo* aranĝita de Dennis Keefe (CN) — patro de LF. Kulturan parton komencis pranepino de A. Grabowski Natalia Dombrowska (PL), kiu prezentis por ni sian programeron per kiu ŝi gajnis ĉefpremion en konkurso „Alproksimigu mondon“. Fine por ni kantis kaj nin dancigis Amir (DK) el grupo Espo Despo kaj Julián Hernández Angulo (CU). Tamen ĝi estis iom malsimila al ĝis nun kutimaj Internaciaj Vesperoj (kaj tio estas ĉefa manko de tiutipa vespero) — estis invititaj famaj gastoj, sed, same kiel en Bjalistoko, mankis eble al konferencanoj prezenti siajn landojn kaj kulturojn ĉu per kantoj, ĉu per dancoj, ĉu per deklamado, ludado aŭ iu alia maniero. Ĉu pola fenomeno? Post kultura programo ĉiutage okazis ankaŭ distra programo — ni dancis ĉiuvespere, dum unu el ili ankaŭ kun dancistruistino Agnieszka (PL), foje aŭdiĝis kubaj ritmoj — ni jam „provludis“ konferencon en Matanzas. Bedaŭrinde ni havis nur unu ejon por vesperaj aranĝoj kaj ne eblis samtempe organizi gufujon por tiuj, kiuj ŝatus en trankvilo babilu, ludi tabloludojn k. s.

Lingva Festivalo jam estas tradicia ero de ILEI konferencoj. Tiamaniere ni dankas al urbo, kiu invitas kaj gastigas nian konferencon. Ĝoje ni donacas al urbanoj eblecon konatiĝi kun pluraj lingvoj kaj kulturoj, ankaŭ konvinkiĝi pri perfekta funkcio de Esperanto kiel lingvo-ponto. Ĉijare LF ne vere estis publika, tamen (laŭ ŝercaj vortoj de Dennis Keefe — ĉeforganizanto) estis 10-oble pli da neesperantistoj ol en Parma aŭ Ranzan. En 5 salonoj okazis entute 15 lingvoprezentoj, estis prezentitaj 12 lingvoj; Esperanto estis prezentita en ĉiu sesio.

En la programo ĉijare estis novaĵoj — rapidkurso de loka (la pola) lingvo kaj prelegserio pri konferenca lando „Ekkonu Pollandon“ (ĉiuj realigitaj de membroj de LKK — estraranoj de la pola sekcio de ILEI). Espereble ankaŭ tiuj ĉi programeroj enradikiĝos kaj iĝos tradiciaj partoj de ILEI-konferencoj. Alia novaĵo — metiejo (realigita de surlokaj, krakovaj esperantistoj). Estus bone ĉiujare havi iun metiejon por konferencanoj. Espereble la poezia metiejo esto/a/is bona komenca paŝo. Aligatorejo elprovita nur ĉijare ne estis tiel sukcesa, kiel en aliaj e-aranĝoj. Plej verŝajne por alkutimiĝi kaj ĝui ĝin en instruista medio necesas havi iun enkondukan programon, ekz., prezenton de malfacile elparoleblaj frazoj unue en loka lingvo, poste ankaŭ en aliaj, kelkajn fazojn en la lingvo de la lando de sekvajara konferenco, eble organizi iun konkurseton

aŭ simile, kaj ĉiuj estu liberaj elekti en kiu lingvo ili parolu (krokodilu, aligatoru, kajmanu, lacertu aŭ ion ajn), inkluzive denaskan.

En sekvaj jaroj dezirindus enkonduki ankaŭ pliajn novaĵojn: libere alireblan tutsemajnan kurson de Esperanto por loka medio; ankaŭ vesperaj kulturaj aranĝoj povus esti libere alireblaj por loka publiko; same libroservo, se ĝi estos aranĝita.

Infanoj havas IJK, junularo IJK kaj junularan programon dum UK, plenkreskuloj UK k. a., instruistoj — ILEI-konferencon, sed mankas aranĝo por tiuj, kiuj tro maljunas por IJK kaj tro junas por IJK aŭ enuas dum UK. Estus dezirinde revivigi „Gimnazon“ por adoleskuloj dum UK aŭ/kaj ILEI-konferencoj.

Estas ankaŭ pliaj ideoj realigendaj kaj realigeblaj, sed ne eblas ĉion enkonduki dum unu jaro. Mi kredas kaj ege esperas, ke paŝo post paŝo ILEI-konferencoj iĝos la plej prestiĝaj kaj la plej popularaj aranĝoj de nia movado. Almenaŭ dum kelkaj jaroj mi strebis al tio kaj vidante kreskon de partoprenatoj kaj pliampleksiĝon de altnivelaj fakaj programeroj, mi kredas, ke ion, eĉ se vere etan, mi (kun helpo de lokaj organizantoj) tamen sukcesis fari tiudirekte.

La lastaj programeroj estis Ĝenerala Asembleo kaj Solena Fermo.

Dum Ĝenerala Asembleo prezentiĝis niaj gastoj, estis preparolita la konferenco mem, okazis diskuto de partoprenantoj kun novelektita estraro, denove estis kunvokita komitato por (ne)aprobi decidojn de la estraro, faritajn dum ties kunsido.

Dum Solena Fermo ni dankis al ĉiuj kunorganizantoj kaj helpantoj, ankaŭ al laboristoj de konferencejo, kiuj estis disponeblaj kaj helpemaj en ajna momento — ili ĉiuj ricevis simbolajn donacetojn. LKK havis la ideon disdoni certigilojn al ĉiuj, kiuj plentempe partoprenis la konferencon. Estis kelkaj homoj, kiuj faris kelkcentkilometran rondvojaĝon por veni kaj gvidi de unu ĝis kelkaj programeroj dum mallonga tempo, sed ili ne ricevis certigilojn. Se ni tiel agnoskus estontece la partoprenintojn, estus bone inkluzivi ankaŭ tiajn kontribuintojn. Aparte pro tio ke ĉiuj aliĝintoj al la konferenco, sendepende de tio ĉu ili plene partoprenis en la laborprogramo aŭ ne, povis ricevi certigilon.

Bedaŭrinde, ne eblis transdoni konferencan flagon al kubaj samideanoj, ĉar ili jam la antaŭan tagon forveturis al Bjalistoko por ĉeesti komitatkunsidojn kaj aliajn aktivaĵojn tie. Unu el la malavantaĝoj konferenci antaŭ UK estas, ke komunajn aranĝojn kun aliaj e-organizoj en tiu kazo plej oportunas plani dum lastaj tagoj, sed aktivuloj ne povas resti ĝis fino kaj forveturas pli frue al UK apenaŭ partopreninte tiujn programerojn aŭ entute ne venas, same kiel ne havas sufiĉe da tempo por veni de mezo aŭ des pli komenco de la konferenco.

Pro malfruo de ĉiuj trajnoj dum kelkaj horoj ne okazis promesita koncerto de JoMo. Tamen por ne fini malĝoje, forigis larmojn de disiro Augusto Casquero de la Cruz regalante per hispanmaniere pretigita vino kaj ni ĉiuj kune tostis je fino de la konferenco, je sano de la organizantoj kaj la partoprenantoj, ankaŭ je sukceso de sekvaj konferencoj.

Gazetara konferenco estis planita tuj post Solena Malfermo, tamen ne okazis pro maltroa interesiĝo de lokaj amaskomunikiloj unuflanke kaj ne sufiĉa strebo de LKK aliflanke (ni eble ne timu estontece ke ĵurnalistoj ofte misinterpretas diritajn vortojn kaj ke poste necesas longe ekspliki al ĉiuj, kio estas la vero). Ĉifoje, do, anstataŭ la planita Gazetara konferenco Dennis Keefe (CN) prelegis pri Lingvaj Festivaloj. Ni tamen havis raportojn en televido kaj radio de niaj amaskomunikilaj patronoj. Kredeble ni ankoraŭ iam havos „duan Bratislava (2004)“ kiam ĉefe LF altiris intereson de entute 7 amaskomunikiloj.

Por komuna veturo per trajno al UK estis planita surprizo — Trajna universitato — tamen por tion realigi necesis havi grandspacan vagonon, sed mendo de ĝi tro kostis. Pro tio ni havis malpligrandajn internaciajn diskutrondojn en kupeoj. En la trajno ankaŭ mankis restoracia

vagono... tamen kun helpo de konduktoro kaj prof. W. Stepniewski estis menditaj manĝoj el ĉina restoracio en Varsovio kaj portitaj rekte al la vagono.

Ĉijare okazis unu aranĝo ekster la konferenca programo al kiu estis invititaj (por aktive kaj pasive partopreni) ankaŭ niaj konferencanoj. Temas pri la Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj en urba kulturdomo (ŜOK) kun kiu kunlaboris s-ino Maria Majerczak. Partoprenantoj de la konferenco estis invititaj prezenti siajn lingvojn, babili en diversaj lingvoj kun loĝantoj kaj turistoj, informi pri Esperanto. Okazis koncerto de JoMo.

Bedaŭrinde, malgraŭ pasintomeraj interkonsentoj, dum ILEI-konferenco ĉijare ne okazis renkontiĝo de *lernu!* uzantoj (ĉu unu el la ebloj por revivigi „Gimnazon“?), same seminarioj de *lernu!* kaj E@I, ankaŭ ne pri kunlaboro en Vikipedio. Tamen espereble tio realiĝos en sekvaj konferencoj. Ni ja havas fortojn por instrui kaj bezonas publikon por spertiĝi, demonstri diversajn manierojn kaj metodojn. Ankaŭ eblas specialaj seminarioj por instruist/ant/emul/oj en plej diversaj niveloj kaj manieroj. Estus ĝojige, se ILEI-konferencoj iĝus veraj Someraj Universitatoj.

Ĝenerale, laŭ opinioj de partoprenantoj, la konferenco estis tre sukcesa kaj tre bona, unu el la plej bonaj dum lastaj jaroj, eĉ eble tro riĉa kaj abunda, ĉar ne eblis samtempe ĉeesti en kelkaj programeroj, kiuj interesis.

Tamen, ni havas celon altiri 300 partoprenantojn, kiam 100 ekskursantoj ne malhelpos havi po 50 aŭskultantojn en ĉiuj 3-4 paralelaj programeroj. Por tio necesas teni same bonan nivelon de fakaj programeroj, havi interesajn ekskursojn kaj varian vesperan (kultutan kaj distran) programon, bonajn loĝkondiĉojn, manĝojn kaj ne grandajn prezojn por ĉio tio, pri kio ĝis nun ni, ŝajne, sukcesis.

Kelkaj programeroj ne estis anoncitaj en konferenca programo aŭ Konferenca Libro, ĉar estis planitaj kiel surprizoj por partoprenantoj.

Ankaŭ personoj, kiuj pro diversaj kialoj ne partoprenis la konferencon, esprimis bedaŭron pro nepartopreno kaj envion al partoprenantoj ekvidinte programon de la konferenco en retpaĝo de ILEI.

Ni invitas ĉiujn al sekvaj konferencoj de ILEI kie per partopreno vi konvinkiĝos, ke

ILEI-KONFERENCO — AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

sed ni avertas, ke tio danĝeras — vi ne plu povos imagi vian esperantumadon sen partopreni konferencon de ILEI kaj rezisti ne plu eblos (ĉu vi memoras ŝercon en reklamo: „Jam gustuminte, ne plu eblas halti.....“). Kaj ni certe ankoraŭ pli kaj pli bonigos ilin ☺.

Mi kaptas okazon ankoraŭfoje danki al LKK, helpantoj kaj ĉiuj partoprenantoj, kiuj per pretigo de bonegaj programeroj kaj simpla partopreno kontribuis al la sukceso de la 42-a ILEI-konferenco en Krakovo. Mi bondeziras sukceson al organizantoj de sekvaj konferencoj kaj tutkore invitas ĉiujn daŭre kunlabori kaj aktive partopreni. Ankaŭ mi pardonpetas, se organizante kelkajn lastjarajn konferencojn ion mi mistrafis kaj ies atendoj ne estis plenumitaj. Bonvolu sendi Viajn pritaksojn, komentojn, rimarkojn, opiniojn, raportojn por konsidero de nuna estraro. Dankon pro kunlaboro!

Aida Ĉiĝikaitė

eksestrarano pri konferencoj,
scienca kaj universitata agado
Vieno, 2009 – 08 – 24